Kontrakto

inter la asocioj

Germana Esperanto-Junularo
Einbecker Straße 36
10317 Berlin
Germanio

(poste nomita GEJ) kaj

Pola Esperanto-Junularo
ul. Andersa 37/59a
00-159 Warszawa
Pollando

(poste nomita PEJ) pri okazigado de komuna jarfina Esperanto-aranĝo **Junulara E-Semajno** (poste nomita JES).

§1 Ĝeneralaĵoj, nomo

GEJ kaj PEJ volas komune organizi Esperanto-aranĝon de la 27a de decembro 2009 ĝis la 3a de januaro 2010. La nomo de tiu aranĝo estas *Junulara E-Semajno*, mallonge JES.

§2 Celoj

JES estu:

- bona, valora evento por la partoprenantoj,
- evoluilo de GEJ kaj PEJ kiel organizaĵoj,
- lernejo de aktivuloj,
- semilo de Esperanto en la regiono, ĉefe en junulara medio (helpe de malferma tago), kaj
- mona subteno al GEJ kaj PEJ.

§3 Organiza strukturo

Reprezentantoj de GEJ kaj PEJ estu inter la ĉeforganizantoj, kiuj krome decidas memstare pri la organizado kadre de tiu kontrakto.

§4 Financoj

1. La kalkulado de en- kaj elspezoj por JES okazas aparte de tiuj de la organizaĵoj.
2. Elspezojn kadre de preparaj antaŭrenkontiĝoj antaŭfinancas GEJ, eblajn antaŭpagojn por la ejo antaŭfinancas PEJ.
3. En kazo de profito, 50% iras al komuna fonduso por uzo en eblaj sekvaj JESoj, 25% al GEJ, 25% al PEJ.

4. En kazo de malprofito GEJ kaj PEJ kovras po 50%.
5. La ĉeforganizantoj komune decidas, kiuj/kiaj elspezoj faritaj de unuopaj organizantoj estas repagindaj. La antaŭfinancanta asocio konservas la respektivajn kvitancojn por la finkalkulado.
6. La ĉeforganizantoj komune taskigas kasiston, kiu zorgas pri librotenado.

§5 Avantaĝoj por membroj

La partopren-kondiĉoj estu aparte avantaĝaj por membroj de GEJ kaj PEJ.

§6 Ŝanĝoj de la kontrakto

Ŝanĝoj de la kontrakto eblas per interkonsenta decido de la estraroj de ambaŭ asocioj.

§7 Perspektivo

Post la unua JES, la estraroj de kaj GEJ kaj PEJ evaluos la rezulton kaj decidos, ĉu kune daŭrigi la eventon en sekvaj jarfinoj. Tiuokaze estu farota nova kontrakto baze de la spertoj.

26a de oktobro 2008

Julia Hell	Łukasz Żebrowski
Prezidantino de GEJ	Prezidanto de PEJ